EKO 2022
Esperiga Komuniko

Subtene al la regiona, landa kaj loka agado

UEA ilei IF EF

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, François Lo Jacomo

**ENHAVO n-ro 13 > • Poznano • Retkursoj • AMO 83 • Fotokonkurso • < feb. 27**

# Interlingvistiko virtualas Poznane

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe Novaĵoj. Jen estas kelkaj informoj pri ĝi:
-----
Titolo: Poznano: Virtuala interlingvistika sesio: Kategorio: Laste en la movado

La interlingvistika grupo, kiu startis en septembro 2021, komencis sian duan semestron virtuale per la februara sesio (2-13.02.2022). Aktuale 33 gestudentoj (el 18 landoj) plenumis siajn ekzamenojn de la unua semestro kaj sekvis la novajn kursojn.

# Retkursoj ŝprucas agarike – esperiga evoluo



La Esperanto-Kursaro Tibor Sekelj anoncas novan kurson de Esperanto je la nivelo **B**1 de KER por ruslingvanoj, ekde la 19-a de februaro 2022, gvidata de s-rino Tatjana Loskutova. Aliĝu per mesaĝo al esperanto-kurso@mail.ru
Bv. komuniki tion al viaj lernantoj kaj varbitoj! La informoj ne restu ĉe la jamaj esperantistoj!

## Litova ret-kursaro

Por ke vi frandu la unikan litovan lingvon, la plej malnovan hindeŭropan lingvon en ekzisto, ni reaperigas ĝian disanoncon:

> *ESPERANTO kalbos kursai jau greitai!*
> *Nuo kovo 1 dienos visus visus visus kviečiame į naujus ir išties inovatyvius esperanto kalbos kursus PRADEDANTIESIEMS*

Gratulojn al la litova landa asocio de UEA kaj bedaŭron al la landaj asocioj, kiuj ne aranĝas retajn kursojn!

Renato Corsetti, komisiono de UEA pri agado en Eŭropo

Amikeco SIA-tempa kaj nuntempa: Temo de AMO 83

# AMO pri Amikeco

**Barbara Pietrzak** (Pollando), la ĝenerala sekretario de UEA tra ses jaroj, skizis la historian fonon de la Semajno de Internacia Amikeco (SIA). Ŝi respondecis en UEA pri SIA tra naŭ jaroj kaj okupiĝis tra 12 jaroj. Ŝi skizis la historion de la fondinto de SIA; la iama vic-prezidanto ekde 1964 de UEA, Erik Carlén el Svedio, kun liaj fortaj ligoj al la kristana asocio KELI kaj ĝia organo 'Dia Regno', kiun li plurjare redaktis. Kerna al la mesaĝo estas la 'interna ideo' kaj paco inter nacioj. Barbara ene de UEA helpis pretigi gvidilon pri la eluzo de la semajno: interŝanĝo de amikecaj kartoj, diskonigo de la aranĝo al ekstermovada publiko kaj plio.




Pli da informoj ĉe:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Erik_Carl%C3%A9n

**Mireille Grosjean** (Svislando) parolis laŭ la temo 'Nekredebla fido'. Ŝi entreprenis multjare egan vojaĝemon, en kiu ŝi spertis veran konatiĝon kun homoj en la loka kulturo. Kutima vojaĝanto kiu vagas inter flughavenoj, turismaj celoj kaj hoteloj simple ne spertas tion kaj eĉ ofte ne rekonas, kion oni maltrafas. Kiel ofte okazas, la veraj eldiraj juveloj venas el la posta diskuto:

> 'Tiu amikeco troviĝas inter ni, bedaŭinde  ne atingas la ŝtatestrojn."
> 'Svislando estas mozaiko de etnoj, ne nacioj'.

**Kimura Goro Christoph** (Japanio). Lia temo: Amikeco, kiu eltenas diferencojn: defio por Esperantujo. Li evidentigis, kiel en Eo-renkontiĝoj kaj eldonaĵoj (ekzemple *Monato*), eblas sperti plej malsamajn opiniojn kaj vidpunktojn. Male, fakaj kunsidoj per naciaj lingvoj tendencas kunigi similpensajn homojn. Li donis bonegan ekzemplon pri malsamaj vidpunktoj ene de eĉ unu familio, inter patro kaj filo. Juvela penso:

> 'Ĉu sub la flago de amikeco povas subkuŝi pretervide gravaj diferencoj?




**Du preleguntoj** forfalis de la viva prezento pro efikoj de la viruso. Du kvalitaj prezentoj, kiujn ni esperas poste pluperi al vi!

**Milton Paulo de Lacerda** (Brazilo): Amiko estas Trezoro. Registrita prezento. Inter la pluraj aspektoj de Amo, oni ĉi momente intencas pritrakti Amikecon.

Tamen, tiucele, antaŭ ĉio, oni bezonas konsideri ties plej profunda radiko kaj fonto, la Amo mem, ne okazu misa ideo de nia temo, atentigis Lacerda. Li aparte pritraktis tri asertojn: Amo en amikeco estas pli ol sento; Eroso estas la kampo de la korinklinoj kaj Amo de Amikeco.

Surbaze de esploro, li atentigis pri ĉefaj postuloj inter 48 kvalitoj de vera amikeco: sincereco (66%), lojaleco en la kompromisoj (39%), konfido (36%), honesteco (34%), respekto (34%), kunuleco (32%), disponebleco (30%), komprenemo (23%), afineco (21%), aŭskultemeco (15%). Lacerda donas liston kun la respondoj al la demando 'Kiel fari kaj konservi amikojn?': Prioritatigu amikecon; Elspezu tempon por tio; Traktu la aliajn ĝentile; Alproksimiĝu, akceptu riskl; Estu asertema; Ne mezuru amon per mezurrubando; Akceptu esti helpata; Ridigu la aliajn, estu gaja; Reprenu pasintajn amikecojn; Estu preta servadi; Estu indulgema en juĝoj; Konservu prefereble vian rideton.

**Martina Kvarantan Šmitran** (Kroatio): Amikeco sub Lupeo. Al la demando ‚Kio donas signifon al via vivo?‘, amikeco ĉiam estas ĉe la supro de tiu listo. Tamen la dinamiko de amikeco restas mistera kaj nemezurebla. Kiel kun romantika amo, amikeco supozeble "nur okazas". Parolante pri faktoj kiuj karakteritas amikecon, Martina i.a. sukstrekis, ke averaĝe dum la vivo ni amikiĝas kun 396 personoj, tamen nur 1 el 12 amikecoj daŭras. Ŝi donis ankaŭ skalon kiu laŭ la esploroj montras kiom da tempo necesas por disvolvi veran amikecon: konateco 40-60 horoj de kunestado; amikeco 80-100 horoj en rilato; por fariĝi la plej bonaj amikoj necesas minimume 200 horoj. Tamen, ŝi atentigas, ke gravas la kvalito de la kunesta tempo, ĉar iu povas pasigi 200 horojn ĉe la drinkejo kun drinkulo aŭ kolego en la oficejo, sen disvolvi nivelon de forta amikeco.




**Monika Molnar** kaj la lernantoj (Svislando): 'Infana percepto de amikeco'. Ni vidis vere mirindajn filmojn! Aŭtentikaj prezentoj de infanaj eldiroj pri amikeco – inkluzive de infanoj, kiuj eklernis Esperanton ene de la lasta semajno. Multegaj el la AM-antoj gratulis ilin. Ni vidis ankaŭ filmojn de pli longtempaj lernantoj. Envenis por vidi kaj gratuli ilin la mulzikgrupo Kajto, kiu restis por koncerti.

Eĉ plia juvela diro, de Monika:

'Se la instruisto pozitivos, ankaŭ pozitivos la lernantoj."

Preskaŭ duono de la seminaria tempo dediĉiĝis al demandoj, komentoj kaj diskutoj pri internacia rilatado, tiom tiklaj, ke mi ne kuraĝas publike dokumenti ilin. Iujn jes.Vere, bedaŭru vi komunumanoj, kiuj ne sekvis la seminarion!

Malfermis kaj fermis la seminarion Stefan MacGill. Enkonduke, li reliefigis la modifon en la emfazo de niaj festadoj. Dum multaj jaroj ili temis ĉefe pri niaj internaj festoj, plej evidente la Zamenhofa Tago decembre kaj la Tago de la Eo-Libro en julio, kaj post tio sekvis SIA. Nuntempe tamen, ni ofte festas Tagojn kaj Jarojn de publikaj instancoj, kiel UN kaj Unesko, kio ebligas al ni atingi pli vastan publikon, sed devigas nin uzi multajn lingvojn. Ferme, li gratulis la prezentintojn kaj la kvaliton de la enhavo – ĝi meritis pli grandan publikon ol la 16 homoj, kiuj ja partoprenis – el Brazilo, Britio/Bulgario, Ĉinio, Francio/Reunio (ja ŝtate identa, kulture ne!), Hungario/Nov-Zelando, Japanio kaj plia lando, Koreio, Kostariko/Usono, Nederlando kaj Slovenio. Elstaras, kiom el ili nun vivas en alia lando ol la naskiĝa. Tio eble helpas en la aprezo de amikeco kaj internacia harmonio.  Laste ni devas konstati, ke la temo de Amikeco trans Limoj akute gravas en nia nuna mondo kaj igas nin repripensi la unikan valoron, kiun havas la esperantistoj.

## Foto-konkurso

Sekvis proklamo de la rezultoj de la foto-konkurso "Amikeco : venis 34 fotoj de 9 partoprenintoj el 5 landoj. Jen la premioj laŭ la decidoj de la ĵurio:

**Unua:** Vera Fabris el Kroatio, pro ‘Amika ĉapelo’.
**Dua egale:** Mirejo Grosjean el Svislando pro foto de si kun Doi Ĉieko.
**Dua egale:** Fransuaz Pellegrin el Belgio pro ‚Amikeco ne bezonas vortojn, eĉ en Esperanto‘
**Tria:** François Randin el Svislando pro ‘Geamikoj’

Ni alkroĉas la plenajn rezultojn, kiel ricevitajn ĵus el Kroatio. Tie vi povas vidi la gajnintajn fotojn, laŭ kaj la ĵurio, kaj la publika voĉdonado.

Sekvis koncertoj: Ĵomart kaj Nataŝa (Svedio); Luis Obando kaj Jahir Cataño (Kolombio): Indiĝena Romanco, Kajto el Frislando.

# Amikeco: Koncepto neniel eksdata – sed akute bezonata!

========= vortoj:  1185 =========

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis la **fino de 2021** (per EKO 2021-58). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.